

BULGARA ESPERANTISTO

MONATA TEKNIKA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

Adreso:
Sofio, Poŝtenska kutija 233

Jarabono: 10 bulgaraj levoj,
0.50 sv. fr. aŭ egalvaloro

Tago de la esperanta libro

Kiu ne konscias la grandan signifon de la libro por la spirita kresko de l' homo? Kiu ne sentis ĝian kuragigan efikon sur la kruta vojo al la belaj menso-pintoj? Kiu, post laciga laboro kaj premigaj vivkondiĉoj, ne serĉis l' oazon de la belliteraturo?

Kiu ne ŝatas la libron? Kaj kiu esperantisto ne ŝatas la esperantan libron? En kies koro ne ĝermas sentoj de sincera dankemo al la nobla laboro de la libro-kreantoj?

Kaj feliĉe, nia esperanto-popoleto jam havas belan tradicion: festi ĉiujare „Tagon de la esperanta libro“.

La 15-an de decembro — je la naskiĝtago de la unua verkinto de la esperanta libro, ni — la anoj de la verda popolo de l' espero, volas reale esprimi nian dankemon al la kreantoj de nia libro — malfermante niajn modestajn monujojn por aĉeti esperantajn librojn kaj aboni esp. gazetojn kaj revuojn. Ne nur enkore ni festadu, ne nur parole ni dankesprimu, sed reale kaj nur reale donante nian subtenon al verkistoj kaj poetoj, al eldonistoj kaj eldonantoj!

Kaj ne malmultaj ili jam estas — la kreantoj de nia literaturo kaj noblaj forĝantoj de la bela estonto de nia lingvo. Ni jam havas niajn verkistojn kaj poetojn, kies koncernaj kapabloj kaj talentoj estas en tre belaj lumo kaj espero: Julio Baghy, Kolomano Kolocsay, Teo Jung, Nikolao Hohlof, Jean Forge, Bulhuis, Helmi Dresen kaj aro da zamtaj abeletoj ĉirkaŭ la literatura abelujo de nia juna lingvo. Ilian ardon ni admiru, ilian agon ni subtenu! Ĉar ne unufoje per siaj belparoloj ili karesis niajn animojn, varmigis niajn korojn, movigis niajn volojn. Ĉar ili plej bone kaj trafe laboras por la alproksimiĝo al la karesata idealo — al la hela tago, kiu trumpetos la triumfon de esperanto kaj kiu alportos kronon al niaj penadoj.

En la „Tago de la esperanta libro“ ni *reale* esprimu niajn ŝaton al la nialingva libro kaj dankemon al ĝiaj verkantoj. Tiel ni montros nin indaj disĉiploj al la spirito de l' unua verkinto de la esperanta libro — al la spirito de nia genia Majstro. T. K. P.

RAĤOVO. La Urba Konsilantaro nomis „Esperanto“ la danuban insulon, situanta 5 kilometrojn oriente de la urbo. La 10-an de septembro j. k. la Urbestro kaj la prezidanto de la loka societo „L. L. Zamenhof“ subskribis

kontrakton konfirman la posedrajton dum 20 jaroj al la tiea esp. organizajo. La lasta havas bonan planon pri beligo kaj ekspluato de la insulo. Ĝojinda kaj gratulinda sukceso!

Bulgara Esp. Asocio

CENTRA KOMITATO

№ 12

la 7-an de Novembro 1930

Sofia

Cirkulero**Al la Esp. organizaĵoj
en Bulgario***Karaj gesamideanoj,*

La lasta kongreso en Sofio signis gravan ŝtupon en la historio de nia enlanda movado. Post kelkjara krizo organiza, la movadon alblovigis refreŝiga vento — el pluraj lokoj en nia lando aŭdigis entuziasmaj voĉoj pri laborpreteco kaj agado. Kaj oni trafe jam akcentis pri racia uzo de niaj fortoj. Sed tio eblus se ni havus centron al kiu sin direktu plenfide la subteno del' apartaj organizaĵoj en la lando. Forte ligitaj al la Centro kaj bone konsiderante la novajn kondiĉojn de poresperanta laboro, ni povus atingi konsiderindajn rezultojn — konkeri novajn poziciojn por la triumfigo de Esperanto en nia lando.

La nova Centra Komitato de B. E. A., konsciante sian devon kaj inspirata de la plej bela deziro vidi la disfloron de nia movado, turnas sin al ĉiuj enlandaj esp. organizaĵoj kaj izolaj esperantistoj kun alvoko pri energia laboro dum la nova asocia jaro. La grundo favoras la esperantan semon — ni semu senĉese!

Duspeca laboro antaŭstaras al ni:

1. Ekstera laboro (propagando: paroladoj, ekspozicioj, favorigo de rolludentaj personoj kaj institucioj al Esperanto, malfermo de kursoj ktp.).

2. Interna laboro (regulaj organizkunvenoj, kleriga kaj perfektiga agado, reteno de nove varbitaj esperantistoj en la organizaĵoj ktp.).

Ni esperas, ke — laŭ viaj lokaj kondiĉoj — vi plenumos vian devon de esperanto-pioniroj. Denove ni substrekas: la grundo favoras la esperantan semon — precipe grandan intereson montras al nia afero la junularo. Ni nepre ĝin verdigu!

La Redakcio de nia organo rememorigas al vi pri nepra abono al „Bulgara Esperantisto“. La malalta jarabono — nur 10 levojn — ebligas al ĉiu esperantisto aboni ĝin. Do kolektu abonpagojn kaj tuj ilin sendu perpoŝtmande laŭ adreso:

Poŝtenska kutija 233 — Sofia.

Fine, ni petas ke vi en plej proksima tempo respondu al la ĉi-kune enmetata demandilo.

Al ĉiuj, bondezirojn pri fruktodona semado por Esperanto kaj

niajn samideanajn salutojn:

Prezidanto:

G. AKTARĜIEV

Sekretario:

T. K. POPOFF

Demandilo al la esperantaj organizaĵoj en Bulgario

1. Kiam estas fondita via organizaĵo?
 2. Kiu estas ĝia nuna estraro? (Adreso).
 3. Kiom da anoj nun ĝi nombras?
 4. Ĉu ĉiu ano abonis la organon „Bulgara Esperantisto“?
 5. Ĉu vi havas klubejon?
 6. Ĉu vi kunvenas regule, kiam kaj kie?
 7. Ĉu vi disponas bibliotekon kaj ĉu vi abonis iujn aliajn esper gazetojn?
 8. Ĉu funkcias kurso(j) kaj kiu(j) estas kursangvidanto(j)?
 9. Kion vi unue akcelas kaj kion vi intencas entrepreni dum la nova societa jaro? (Skizu vian planon pri estonta agado).
 10. Kiajn petojn kaj dezirojn vi havas al la CK de BEA?
- Preĝu la respondojn laŭeble plej baldaŭ kaj sendu ilin al adreso:

Bulgara Esp. Asocio, poŝtenska kutija 233 — Sofio.

„Balkana konkordo“

Vi certe lernis Esperanton, ĉar vin allogis la bela ideo faligi la murojn inter popoloj;

ĉar viaj moralaj aŭ materialaj interesoj vin vokas trans la limojn de via malgranda lando, tien, al aliaj popoloj, dividitaj de vi per la lingvaj baroj;

ĉar vin karesas la varmeco de unu granda rondo familia;

ĉar la paco eterna estas la ĉiam sopirata de vi idealo...

Do, vi devas nepre legi kaj subteni almenaŭ unu esperantan revuon, kiu kontentigos viajn sopirojn kaj donos al vi eblecon praktiki la lingvon per interesa por vi legaĵo.

Vi devas nepre aboni kaj abonigi vian revuon — „*Balkana konkordo*“, organo de la tuta balkana duoninsulo.

Dank' al „*Balkana konkordo*“ vi eksentos ligitecon kun samideanoj el ĉiuj ses balkanaj landoj, ĉar vi scios ke nome ĝi ligas vin ĉiujn — por

ĉiuj ĝi estas „nia komuna organo“, kaj sekve, por vi lingvaj baroj ne ekzistos.

„*Balkana konkordo*“ agos per ĉiuj fortoj por la pacigo inter balkanaj popoloj, pensante ĉiam kaj ĉiel vastigi nian semideanaran rondon, en kiu la malkonsentoj estas likviditaj plej racie.

„*Balkana konkordo*“ komencos aperi de januaro 1931, sed la unua numero aperos jam meze de decembro, do post unu monato

La abonpago por Bulgarujo estas 80 levojn. Do „*Balkana konkordo*“ estos la plej malkara internacia revuo en Esperanto, kiu tamen laŭ enhavo kaj eksteraĵo kontentigos ĉies guston.

Sendu la abonpagon tuj al la administracio de la revuo — Sofia, poŝtenska kutija, № 233.

Subtenu ankaŭ la garantian kapitalon oferante laŭ via ebleco!

Pro manko de loko la rubrikoj: „Enlanda movado“, „Sciigoj“ kaj „Bibliografio“ restas por la sekvanta duobla numero, kiu aperos meze de decembro j. k.

CENTRA KOMITATO. Marikin kaj membroj: S-ino Berta
La lasta kaj definitiva konsisto de Marinova kaj s-roj Hugo Bär, Boris
la C. K. de B. E. A. estas: Veličkov kaj Teodor K. Popoff.
Prezidanto — S-ro G. Aktarĝiev, S-roj D-ro Zah. Zahariev kaj Bo-
vicprez. S-ro D-ro At. D. Atanasov — ris Veličkov ekzigis pro privataj mo-
Agro, sekretario-kasisto — Ljuben P. tivoj.

Esperantistoj, atentu!

Aperis nova

LEARNLIBRO DE ESPERANTO

DE D-RO ZAH. ZAHARIEV

verkita laŭ la rekta (parola) metodo kun 335 bildoj en la teksto. La gramatikaj reguloj estas klarigitaj per bildoj. La ekzercoj kaj la legaĵoj estas analizitaj per demandoj kaj respondoj, kiuj ebligas facilan, korektan kaj rapidan ellernon de Esperanto. Speciale taŭga por kursoj. Paĝoj 160, prezo 50 levoj.

Havebla ĉe **ST. ATANASOV**
Neofit Rilski 36, Sofio, Bulgario

Certe vi jam legis pri la proksima reapero de LITERATURA MONDO

la bone konata arta kaj literatura revuo monata, sub la redaktado de Julio Baghy kaj D-ro Kolomano Kolocsay, Budapest (Hungario).

Plaĉa teknika aranĝo! Varia valora enhavo!

Jarabono: 260 levojn, duonjare: 130 levojn.

Abonejo por Bulgario:
CENTRA LIBREJO „ESPERANTO“
Bul. „Maria Luiza“, 38 — Sofio

De la sama adreso petu katalogon de esperantajoj!

Plena vortaro de ESPERANTO

esperanto-bulgara kaj bulg.-esperanta partoj. Havebla ĉe:

S-ro **IVAN H. KRESTANOV**
instruisto en la Komerca Gimnazio
Plovdiv (Bulg.)

Prezo: 75 lv. Bindita 90 lv.

Al esp. organizaĵoj 20% rabato

Aranĝanto: Teodor K. Popoff

Atentu! Esperantaj literaturo kaj
insignoj

**8, 10, 12, 15 kaj
16 levojn**

Demandu katalogon!
DIMITR TUĜAROV — T. Pazarĝik

INTERŜANĜO

de poŝtmarkoj deziras s-ro Kowarsek,
Bogenstr. 7 | Muenster i. W. Germanio

Presejo „Posrednik“ — Sofia